Jarkolekto : 2013 | Numero : 3 | Paĝo : 1

# La Voĉo de Amikejo

Informilo pri ***Senlime*** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

BELGIO NEDERLANDO GERMANIO

Senlime

Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Bonvolu pagi, prefere antaŭ la jarfino, **NUR** al la konto :
**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

La abono al la papera versio de nia informilo (12 €) **NE** enhavas la kotizon al ***Senlime*** (10 €).

## ENHAVO :

**p. 1 : *Senlime* 20-jara : FESTU !**
**p. 2 : Niaj programeroj lupee**
**p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2013-2014 (1/2)**
**p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo**
**p. 5 : La lasta FESTO antaŭ la mondfino**
**p. 6 : Verviersa angulo (FESTO 2013)**

Kiel anoncite en nia pasinta numero, nia kara asocio, ***Senlime***, ĉi-jare jam estas 20-jara. La evento ja ne estis nepre festenda, kaj post la 100-jariĝo de la esperantista grupo en Verviers kaj la 125-jariĝo de esperanto, la komitato ja intencis (relative) diskrete preterpasi tion, rezervante siajn fortojn por brila 25-jara festo (kelkaj interesaj aferoj prepariĝas en la regiono por 2018)…

Sed feliĉe, hazarde (ĉu vere ? mi ne tute kredas je hazardo…) alvenis por ni neatenditan helpon : jen la responsuloj de **JEFO** (Junulara Esperantista Franca Organizo), kiuj ne okupiĝas nur pri bagatelaĵoj por junuloj, interesiĝantaj pri ***Amikejo*** (kiu celis esti feria festejo por esperantistoj el la tuta mondo), decidis tie organizi sian **FESTO**n 2013an (la unua post la mondfino diris ili… eble tre prave ĉar ĉu nia freneza mondo ne ŝajnas al vi iomete – aŭ eĉ multe – ŝanĝiĝema?).

Por la regionaj esperantistoj, inter kiuj membroj de ***Senlime*** kiuj ja ne sentas sin maljunaj, jen escepta okazo surloke ĝui pri esperanto, muziko, amikeco, ĝojo kaj bonhumoro kun (tro malofta fakto!) junuloj dum unu tuta semajno. Sed jen ankaŭ nemaltrafinda okazo konatigi esperanton (la plezurigan esperanton, ne nur la postuleman «nemalhavindan lingvan solvon») al la tuta urbeto, kaj aparte al la loka junularo.

Kun plezuro ni do abunde informas vin pri muziko kaj **FESTO**j en tiu-ĉi informilo kaj invitas vin partopreni (kaj eble kunlabori) al tiu granda evento : unuafoje post la malapero de **Neŭtral-Moresnet**, multaj esperantistoj denove okupos la urbon.

***Bonvenon al ili, bonvenon al vi ĉiuj (esperantistoj aŭ ne) !***

# Niaj programeroj lupee

***detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…***

**FESTO 2013**

*La suba invito venas de Alekŝjo, prezidento de **JEFO** kaj ĉeforganizanto de **FESTO 2013**.*

**FESTO 2013** okazos de la 10a ĝis la 18a de aŭgusto 2013 en Kelmis-Amikejo. Preskaŭ 100 jaroj poste, ni revenas tien por granda semajno de plej diversaj muzikoj en esperanto!

La taga programo konsistos el promenadoj, prelegoj pri diversaj temoj kaj artaj aktivaĵoj. Se vi estas muzikisto, nepre kunportu vian muzikilon. Ĉeestos ankaŭ gitara instruisto por tiuj kiuj volas lerni tiun mirindan muzikilon.

La nokta programo konsistos el koncertoj, ludoj kaj bona tempo kune.

La koncertoj satigos ĉiujn gustojn de muziko: repo ĝis roko, popo ĝis elektro: ni forgesos nenion. Post la koncertoj venos DJ kaj MC el la tuta mondo por dancigi la diskotekon ĝis la noktofin'.

Pli kvietaj homoj ankaŭ povos ĝui mirindajn kaj senfinajn ludadojn, teumi aŭ bierumi en la trinkejo...

Ni ankaŭ ekskursos al **Lieĝo**, **Mastriĥto** kaj **Akeno**.

La renkontiĝo estas malfermita al ĉiuj, kiuj sentas sin june en la koro, kaj kiuj pretas ĝui muzikon, amikecon, ĝojon kaj esperanton!

La gastigado okazos en tre moderna junulara domo kun tuta moderneco kaj komforto. Ankaŭ eblos tendumi aŭ loĝi en luksa gastejo.

Aliaj informoj pri tiu festivalo : http://festo.jefo.fr (aliĝu plej rapide!).

Ni ankaŭ starigos karavanojn kiuj portos vin de IJS aŭ de aliaj urboj de Germanio ĝis FESTO, kaj reen! Pliaj informoj pri tiu: http://alesk.eu/karavano/karavanoj-al-festo-2013/

**08-16** 20h00 BE-Kelmis, Patronage : tiun vesperon (minimume !) ni kune vizitu tiun **FESTO**n **2013**an.
Inf. Jean-Marie **Jacques** jacques@senlime.org

**Konversaciaj tabloj**

Plian fojon, ***Senlime*** proponas al siaj membroj konversaci-tablon.

Tiaj konversaci-tabloj jam de pluraj jaroj funkcias per plej diversaj lingvoj, interalie en Vervierso (ili ricevis la Eŭropan markon pri lingvoj en 2002). Simile okazas diversloke «esperanto-kafejoj»…

Ĉi-foje, la temo estos la agado de Senlime/E.G.V. okaze de la prezento de la jaraj raportoj (ĉar nek ***Senlime*** nek E.G.V. estas ASPC, la ĝeneralaj asembleoj rajtas preni tian «interaktivan» formon).

**09-20** 20h00 BE-Kelmis, Select: "***Konversacia tablo***".
Inf. Jean-Marie **Jacques** jacques@senlime.org

**La universala lingvo**

Post mallonga periodo da nur 125 jaroj, esperanto nun estas unu el la 100 plej uzataj lingvoj, inter la 6.800 idiomoj parolataj tra la mondo. Temas ja nun pri «universala lingvo».

"***La Universala Lingvo***" estas nova dokumenta filmo de Oskar-premia nomumito Sam **Green**. La 30-minuta filmo kaj spuras la historion de Esperanto kaj estas portreto de la hodiaŭa Esperanto-movado.En ĉi tiu pionira dokumenta filmo pri la lingvo, **Green** kunplektas intervjuojn kaj portretojn: kiujn li filmis ĉe pluraj lastatempaj Universalaj Kongresoj kun trezoro da neniam viditaj arĥivaj bildoj pri **Zamenhof** kaj la frua Esperanto-movado. La filmo ankaŭ inkluzivas intervjuojn kun Humphrey **Tonkin**, Arika **Okrent** kaj multaj aliaj. "*Mi spektis La Universalan Lingvon kun granda plezuro kaj esperas, ke ĝi sukcesas kiel ĝi meritas.*" diris Renato **Corsetti**. "*Kelkaj homoj en Kopenhago sin esprimis, ke oni devintus fari pli propagandecan filmon. Ili ne komprenas, ke objektiva filmo estas pli forta.*"

Post la «**FESTO 2013**» en Kelmis, ***Senlime*** volas «enbati la najlon», prezentante tiun filmon al la loka enloĝantaro ne-esperantista.

**10-18** 20h00 BE-Kelmis, «***The Universal language***» [***La universala lingvo***] (filmo de Sam **Green** kaj debato pri esperanto hodiaŭ).
Inf. jacques@senlime.org

# ESPERANTO✪

## Eŭregiona kalendaro 2013-2014 (1/2)




***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

**07-19** Feria fermo de la Select (komitata kunveno en Verviers).

**08-16** 20h00 BE-Kelmis, Patronage : **FESTO 2013**, muzika festivalo organizita kunlabore kun EUROKKA, okazos de la 11-a ĝis 18-a de aŭgusto (koncertoj, k.t.p.).
Inf. jacques@senlime.org

**09-20** 20h00 BE-Kelmis, Select: konversacia tablo kaj ĝeneralaj asembleoj.
Inf. jacques@senlime.org

**10-18** 20h00 BE-Kelmis, Select: "La Universala lingvo", filmo de **Sam Green**.
Inf. jacques@senlime.org

**11-15** 20h00 BE-Kelmis, Select: "La franca, stulta lingvo", prelego de Didier **Lousberg**.
Inf. lousberg@senlime.org

**12-15** Zamenhof-festo (loko kaj horo proponota).
Inf. jacques@senlime.org

✪

Pliaj kunvenoj okazos en Kelmis (Select) ek de la 15-a de marto, ĉiun trian vendredon de la monato je la 20a horo (informoj en nia sekvonta trimonata informilo).
Inf. jacques@senlime.org

**19-07** Congés annuels au Select (réunion du comité à Verviers).

**16-08** 20h00 BE-Kelmis, Patronage: **FESTO 2013,** festival musical organisé en collaboration avec l'association de musique rock EUROKKA, du 11 au 18 août (concerts, etc.).
Inf. jacques@senlime.org

**20-09** 20h00 BE-Kelmis, Select: table de conversation et assemblées générales.
Inf. jacques@senlime.org

**18-10** 20h00 BE-Kelmis, Select: "The universal language", film de **Sam Green**.
Inf. jacques@senlime.org

**15-11** 20h00 BE-Kelmis, Select: "Le français, langue idiote", conférence de Didier **Lousberg**.
Inf. lousberg@senlime.org

**15-12** fête Zamenhof (lieu et heure à proposer…).
Inf. jacques@senlime.org

✪

D'autres réunions auront lieu à La Calamine (Select) à partir du 15 mars, chaque troisième vendredi du mois à 20 heures (informations dans notre prochain bulletin trimestriel).
Inf. jacques@senlime.org

# Novaĵoj pri KELMIS-AMIKEJ✪.

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

**Elsendo "*la landlimo*" [de grens]**

Dimanĉon, la 24an de marto, la Nederlanda televido (NOS2) elsendis la 5an epizodon de la nederlandlingva serio "***la landlimo***" kies temo estis "La Limo en Limburgo - La forgesita lando".

La fama nederlanda verkisto Tommy **Wieringa**, vojaĝante laŭ la suda limo de Nederlando, en Limburgo, fine de la epizodo - post vizito al la kvarlanda punkto – renkontas "lastajn idealistajn esperantistojn" (tio estas ***Senlime***-anoj en Select, Kelmis) kiuj daŭre kunvenas en la "forgesita lando", la iama Neŭtrala Moresnet/Amikejo.



R. **Demarche**, M. **Schrymecker** kaj T. **Wieringa** en Select, Kelmis

La tuta elsendo (25 min.) estas videbla ĉe YouTube je la adreso https://www.youtube.com/watch?feature=player_detailpage&v=707hXMcURIA

Lumdisko (nederlandlingva) kun la tuta serio (6 elsendoj) estas havebla, nur de VPRO, ĉe http://winkel.vpro.nl/ -19.95 EUR.

**Pliaj surtekstoj de *Senlime*: "*Brassed Off*" [La Virtuozoj]**

Ĉi-jare ***Senlime*** estas dudekjara... kaj kompreneble, tiu-okaze tre aktivemas, precipe centre de Euregiono Mozo-Rejno: Kelmis, iama Amikejo.

La ĉefa kialo de la ekzisto de tiu Neŭtrala ŝtateto estis la ena ĉeesto de zink-minejo tre alloga (interalie laŭ milita vidpunkto) por la najbaraj landoj. Tiu minejo do ankaŭ estis unu el la ĉefaj vivrimedoj por la enloĝantoj kiuj amase laboris tie...

La plej granda parto de la popolo de Amikejo ne nur laboris sed vivis en la mineja kvartalo kaj la societo "**Vieille Montagne**" [Maljuna Monto] al kiu ĝi apartenis starigis diversajn helpajn kaj kulturajn asociojn, inter kiuj fanfaro, por siaj laboristoj.

Neeviteble, la zink-minejo iam elĉerpiĝis kaj (en 1932) fermis, kune kun la fanfaro. Post la milito 1940-1945, kelkaj el la iamaj anoj de tiu fanfaro decidis, kun aliaj muzikistoj, krei en Kelmiso "Harmonion", kiu hodiaŭ estas konsiderita kiel la plej bona orkestro el la germanlingva parto de Belgio.

Kompreneble similaj eventoj okazis (kaj plu okazos) en diversaj urboj tra la tuta mondo. Meze de la jardeko 1980, en la vilaĝeto de **Grimley**, norde de Britujo, ministoj kaj iliaj familioj baraktis kontraŭ la fermo de la loka minejo kadre de la nacia programo pri fermado de la karb-minejoj. Inter ili, fanfaranoj...

La aventuron de tiuj muzikistoj, ŝiritaj inter unuflanke amo pri muziko kaj espero partopreni la finfaron de la nacia konkurso por fanfaroj, kaj aliflanke la perspektivo perdi sian laboron kaj vidi la diseriĝon de sia minista komunumo, talente rakontis la filmisto Mark **Herman** el Britio, en agrabla filmo "***Brassed Off***" [La Virtuozoj/Les Virtuoses], kun Pete **Postlethwaite**, Tara **Fitzgerald** kaj Ewan **McGregor**.




Vidu nian retpaĝon: http://www.senlime.be/Kino/Virtuozoj.htm... kaj eventuale elŝutu niajn surtekstojn.

Memoru ke ***Senlime*** provizas nur siajn surtekstarojn en esperanto ; la filmojn (jam pli ol 20) vi mem akiru laŭ viaj preferoj (se vi disponas pri DVD, necesas fari el ĝi Xvid- aŭ DivX-kopion). Eventuale povus utili al vi la (senpage elŝutebla) softvaro "Subtitle Workshop" por rapidege pli- aŭ malpli-fruigi surtekstojn laŭ la film-versio pri kiu vi disponas.

Bonan amuziĝon !

# FESTO 2012

Por atingi FESTOn 2012 necesis veturi tra la Ĵurasa montaro kaj veni al la skistacio de **Métabief** piede de la Ora Monto (Mont d'Or) ĉe la limo inter Francio kaj Svislando. Estas belega montara loko kaj ankaŭ relative disa kun tamen la koncertejo en la centro. La suno kaj la bela vetero ankaŭ varmigis la etoson kaj ebligis al la partoprenantoj sunumi, bani sin en montaraj lagoj kaj ekskursi en la montaro, en la urboj Besançon kaj Neuchâtel en Svislando.

La interkona vespero okazis **vendrede**, la 17an de aŭgusto, kaj konsistis ĉefe el ludoj kaj poste estis malfermo de la trinkejo kun fona muzika etoso, kaj homoj babilis ĝis ne tro malfrue post noktomezo.

**Sabate** vespere la koncerto de ***Zhou-Mack*** Mafuila donis viglan kaj varmdancigan tonon laŭ la ritmoj de la Afrika rumbo kaj regeo por la malfermo de la arta programo de FESTO 2012.



***Zhou-Mack***, ĉefkantisto kaj ritmgitaristo, estis akompanita de ses muzikistoj. Ili prezentis plejparte kantojn el la Esperanto-albumo ***Originoj***. Kelkaj kantoj estis en la lingala kaj kikonga lingvoj, afrikaj lingvoj el Kongo. La publiko estis ĉarmita kaj kontribuis dancante kaj kunkantante la rekantaĵojn. Post la koncerto DĴ ***Leo*** startigis la diskejon kiu dancigis homojn ĝis la 4a horo.

**Sekvis ilin** ***Stoïc Drama***, roka triopo el la proksima urbo Belfort kun vigla rokkoncerto. Elstara kaj peza sono de gitaro, baso kaj drumo de junaj muzik-istoj tre promesplenaj… La voĉo de la kantistino-gitaristino estis sorĉa kaj tre bone kongruis kun la muziko. Tuj sekve la koncertejo transformiĝis je diskejo de DĴ ***Leo***, kiu sonigis ĝis la 5a matene.

**Lunde**, la 19an, la vespero disvolviĝis laŭ kabareda etoso per koncerto de ***Gijom*** ĉe voĉo kaj piano akompanata de ***Espo Despo*** akustike. La rezulto estis elstara, kaj tiu kunludado alportis alian dimension pro la muzikaranĝoj al la repertuaro de ***Gijom***, kiu kutime akompanas sin de nura piano…

La dua parto estis koncerto de ***Dolĉamar***. Por tiuj, kiuj konas ***Dolcxamar*** kun X kaj *Dolchamar* kun H, estis vera surprizo la nuna versio de ***Dolĉamar*** kun Ĉ. La nova *Dolĉamar* konsistas el Pieĉjo (Patrik Austin) kiu ne plu ludas sursceneje kutimajn instrumentojn sed elektronikaĵojn kun kantoj el la albumoj ***Lingvo intermonda*** kaj ***Trajn'nenien***. La muziko elektroniĝis laŭ la aktuala danciga klubeca stilo. La publiko remalkovris malnovajn kantojn de ***Dolcxamar*** kaj ***Dolchamar*** sub alia sono-vesto kaj malgraŭ tio ili kunkantis kaj dancis. Tiu nova muzikvojo de la artisto ankaŭ malfermas perspektivon por nova muzikĝenro en Esperanto kaj antaŭvidigas prilaboron de nova albumo de ***Dolĉamar*** post pli malpli du jaroj. Post la sukcesa koncerto, DĴ ***Leo*** revenis por reaktivigi la diskejon.

**Marde** okazis regea vespero kun ***Jonny M***, kiu koncertis kun la asisto de DĴ ***Leo*** ĉe miksiloj. La stilo de ***Jonny M***, kvankam regea, malsimilas al tiu de ***Zhou-Mack*** Mafuila, ĝi havas pli elektronikajn sonojn kaj foje randas ĉe la limoj de hiphopo. ***Jonny M*** ardigis la scenejon, la publiko bonege akceptis la artiston kaj kunludis kun li, reeĥante lian entuziasmigan energion. La publiko kaj la artisto kunfandiĝis. Post la koncerto DĴ ***Leo*** faris sian lastan diskejan vesperon ĝis la 2a nokte.

**Merkrede** prezentiĝis la loka artisto ***Billy Fumey***, kiu kantis en la arpitana (francprovenca lingvo). ***Billy*** akompanas sin per akustika gitaro kaj revivigas per siaj kantoj la arpitanan lingvon laŭ folka stilo. Postkoncerte homoj gufumis ĉe la fajro ĝis malfrunokte.

**Ĵaŭde**, la 22an de aŭgusto, estis la lasta tago de FESTO. Vespere la kvarpersona Pariza teatro-trupo ***Kvak*** prezentis la teatraĵon ***Karotkapo*** de ***Jules Renard***. La aktoroj bonege interpretis la rolojn. Post la spektaklo ekis internacia vespero, en kiu la organiza teamo sin prezentis kun la helpantoj kaj kunlaborantoj, kaj pluraj partoprenantoj muzikis, kantis kaj skeĉis. La belgaj partoprenantoj prezentis ***Amikejo***-n en Belgio, kie okazos **FESTO 2013** – la unua post la fino de la mondo!

Raportis festece por vi **Flo!**
Fotis **Sjoerd Bosga**

El ***La Ondo de Esperanto***, 2012, №10.

# Verviersa Angulo

## Verviersa Esperanto Grupo

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
Jean-Pol Sparenberg
20 Ruelle de Thuin
6540 LOBBES
Tél. 071/59.15.42

---

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte

**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*Ce bulletin d'information peut être intégré à la revue de APE «Espéranto en marche». Les montants des abonnements et cotisations à APE et/ou UEA.*

*La cotisation pour **Senlime** reste fixée à **10 Euros**.*

**Indiquez les nom, prénoms et domicile du membre cotisant ainsi que l'association bénéficiaire:**

***«cotisation de…. pour….».***

**D'avance, merci à tous !**

# *FESTO 2013,* le **premier festival** de musique en **espéranto** à Kelmis

**FESTO 2013** aura lieu du 10 au 18 août au «Patronage» de La Calamine, dans le territoire d'Amikejo (Moresnet-Neutre), cette micro-nation qui avait adopté l'espéranto il y a plus de 100 ans. Le rêve redeviendra réalité pour toute une semaine de musique et chansons en espéranto.

Le programme des journées consistera en promenades, conférences et diverses activités artistiques… en espéranto. Que les musiciens apportent leurs instruments ! Un professeur de guitare sera même présent pour tous ceux qui veulent apprendre ce merveilleux instrument.

Le programme nocturne consistera en concerts, soirées dansantes, jeux et bon temps…

Les concerts satisferont tous les goûts musicaux: du rock au rap, du pop à l'électro, rien ne sera oublié, avec des groupes et chanteurs espérantistes venus de leurs lointains pays.

Après les concerts, des DJ du monde entier vous feront danser dans la discothèque jusqu'à la fin de la nuit!

Les plus calmes pourront jouir de merveilleux et interminables jeux ou tout simplement siroter un thé ou déguster une bonne bière (attention si vous conduisez!)…

Sont bien entendu aussi prévues des excursions, entre autres vers les villes toutes proches de Maastricht, Liège et Aachen.

Ce véritable festival musical d'été en espéranto est ouvert à tous ceux qui se sentent jeunes dans le cœur et qui sont amateurs de musiques, d'amitiés, de joies… et d'espéranto !

On attend plus de cent résidents qui seront logés dans une maison de jeunes très moderne (dont la rénovation s'achève au moment où nous écrivons ces lignes) et confortable. Il leur sera aussi possible de camper dans la prairie voisine ou de loger plus luxueusement dans des chambres d'hôte à proximité.

La population non-espérantiste est également cordialement invitée à assister aux concerts du soir, une occasion exceptionnelle, notamment pour nos jeunes, de voir fonctionner vraiment l'espéranto.

FESTO 2013 n'est qu'une partie d'une longue chaîne de festivals qui a commencé en 1996 à Lyon (France), pour avoir lieu chaque année en été. C'est l'association « Espéranto-Jeunes France» qui l'organise avec l'association de rock EUROKKA.

FESTO veut dire fête mais aussi «*Franca Esperanto-Semajno Terure Organizita*» [Semaine espérantophone française terriblement organisée] : en fait, la fête se caractérise par un terrible manque d'organisation : vive l'improvisation !

Autres informations sur FESTO:
http://festo.jefo.fr

Article en espéranto p. 5